

DECEMBRO 2016



La «Espéranto-Gironde» Informilo

N° 149

Feliĉan Jaron 2017



NI FUNEBRAS

Micheline Demontoux forpasis la 25an de novembro, unu monaton post sia 98a datreveno. Ŝi okupis la postenon de kasistino de Esperanto-Gironde dum multaj jaroj kaj tre aktivis sine de la grupo. Niaj amikaj pensoj iras al ŝia familio.

Monique

Micheline, dum la festo al Simonne, en 2003



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Moline STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono B111, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

ĜENERALA ASEMBLEO DE ESPERANTO-GIRONDE, DIMANĈON la 6an de NOVEMBRO 2016 je la 10a 30 en CREON

Ĉeestis: Annie Brilleaud, Jean-Séb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Bruno Ferré, Marie-Thérèse Guillaume, Peio Labbé, Claudine Pomiról, Marcelo Redoulez, Bernardo Sarlandie, Morine Stride.

Senkulpigitaj: Gloria Gargallo, Christiane Jagueneau, Michel Jagueneau, Joël Lajus (kun rajtigilo al Janine Dumoulin), Bernard Vidal

La kunveno komenciĝas je la 11a.

La prezidanto Elvezio salutas ĉiujn kaj dankas al Morine kaj Peio pro ilia gastigado.

1/ Agad-raporto (fare de la sekretariino)

Janine prezentas la agadraporton.

De post la ĝenerala asembleo de la 29a de novembro 2015:

- Okazis 2 kunvenoj

- Reĝfesto la 10an de januaro en Créon
- Kunveno en Montendre la 20an de marto

- Aliaj okazaĵoj

- La 15an de decembro: Vizito de la Laborborso okaze de la Zamenhoftago. Tiu vizito estis organizita de Bernard. Pluraj el ni ĉeestis kaj poste spektis la filmon *Esperanto*. Kelkaj membroj de sindikato CGT ĉeestis la projekciadon de la filmo.

- La 6an de februaro: Partopreno de pluraj el ni en la centjariĝa festo por Pedro Sevilla.

- La 12an kaj 13an de marto: Partopreno de pluraj el ni en la mara staĝo apud Limoĝo kun La Kompanoj.

- La 24an de marto: Pluraj el ni ĉeestis la prelegon de Saeed Ahmad, el Pakistano, en la Universitato de Bordojo.

- La 3an de julio: La membroj de Esperanto Gironde estis invititaj al la 20jara jubilea festo de Montendre Esperanto Grupo. Dudeko da homoj ĉeestis.



- De la 13a ĝis la 17a de julio: La Kompanoj estis invititaj al la festivalo «Eŭropaj renkontiĝoj» en Châtillon-sur-Indre kaj vigle partoprenis en la artaj aranĝoj.
- La 4an de septembro: La Kompanoj partoprenis en la 20jara jubilea festo de Esperanto Vendée, per surplaca kunkantado kaj vespera spektaklo pri Brel.



- La 29an de septembro: Estis proponita prelego de François Randin en la Universitato de Bordojo, sed bedaŭrinde neniu studento aŭ profesoro ĉeestis.

- La 5an de oktobro: Bernard reprezentis la membrojn de Esperanto Gironde je la entombigo de Pedro Sevilla, forpasinta la 1an de oktobro.

Cetere de septembro Morine laboras pri nova logotipo por Esperanto-Gironde.

- LEGI

Dum tiu jaro, la membroj de Esperanto-Gironde ricevis 3 numerojn de LEGI.

La agadraporto estas unuanime aprobata

2/ Financa bilanco (fare de la kasistino)

Monique présente le bilan financier.

Le compte courant d'Espéranto Gironde présente au 6 novembre 2016 un solde positif de 532,15€ et le Compte Epargne présente au 6 novembre 2016 un solde positif de 4673,52€. (Voir détails en annexe)

A noter :

- En 2016 il y a eu 28 adhésions à Espéranto Gironde (contre 31 en 2015).
- L'association a bénéficié de dons (règlement d'adhésions à l'arrondi, par exemple) s'élevant à 25€.
- Le CD de Morine a rapporté 485€

La cotisation reste inchangée pour 2017: 17€ en individuel et 23€ pour un couple.



Il est décidé que le trop payé pour la tournée de Saeed reste à Yves Nicolas pour une tournée ultérieure.

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité

3/ Projektoj

- Le nouveau logo d'Espéranto Gironde



Morine présente les versions successives du projet. Le dernier retenu est jugé dynamique, clair, lisible même réduit.

Peio suggère de faire des tee-shirts. Morine et Peio se renseigneront sur le coût.

Un questionnaire sera inséré dans le prochain LEGI pour savoir combien de personnes peuvent être intéressées.

Les enveloppes et feuilles de papier à lettre avec l'ancien logo seront utilisées jusqu'à épuisement.

- Une nouvelle fédération sud-ouest ?

Bernard fait part d'un courrier qu'il a reçu en septembre 2015 de Gisèle Gizard, qui propose la fondation d'une nouvelle fédération d'espéranto sud-ouest, après la disparition de celle qui existait précédemment.

Claudine estime qu'il serait imprudent de fonder une nouvelle association alors que la plupart de celles qui existent perdent des membres.

Il est décidé qu'Elvezio prendra contact avec Gisèle Gizard pour avoir plus de précisions.

Morine demande ce que regroupe exactement Espéranto Gironde.

L'association, installée en Gironde, regroupe des membres adhérents d'où qu'ils soient, mais dont la plupart résident en effet en Gironde. Il existe trois autres associations du même type en Gironde : Espéranto Gujan-Mestras, Espéranto Galgon, Espéranto en Pays foyen.

- L'espéranto à l'université

Bruno suggère de distribuer des tracts dans les cités universitaires, pour inviter par exemple à une réunion d'information.

Elvezio précise que les cours n'ont pas encore commencé à l'université. Les étudiants présents l'an dernier ne sont plus là. Il faut donc constituer un nouveau groupe. Aurora, étudiante intéressée, ne peut pas assister aux cours du mercredi soir.

Monique : M. et Mme Léglise, nouveaux venus à Espéranto Gironde, habitent à Mérignac. Ils peuvent venir à Cenon le lundi ou chez Jean-Séba, ainsi qu'Auro-ra.

- Le site internet

Yannick peut s'occuper de créer le site d'Espéranto Gironde sur le modèle de celui des Kompanoj. Il faudra lui donner un contenu.

En ce qui concerne le site des Kompanoj, il a ajouté, à la demande de FA-MO, de nouvelles chansons ainsi que de nouvelles versions de chansons antérieures. De ce fait les enregistrements et partitions existants ne conviennent plus. Il manque aussi les enregistrements des chansons nouvellement ajoutées. On ne peut pas laisser les deux versions des chansons qui ont été modifiées faute de place et pour des raisons de clarté.

Un lien du site des Kompanoj vers le site de Morine permettra d'avoir accès à l'écoute du CD (soprano.morine-stride.com)

On pourra alimenter le site d'Espéranto Gironde par des articles de LEGI, des photos. On pourra aussi tracer l'historique de l'association grâce aux livrets rédigés par Léo. Mais il faudra les retaper entièrement.

Bruno propose un forum, par exemple pour échanger des traductions.

On peut aussi y mettre des annonces et ce qui a été fait depuis 1992 (les différents congrès...), ainsi que les contacts et les lieux et horaires des cours proposés.

Yannick précise que l'on peut donner les codes de rédacteurs à un grand nombre de personnes, qui soumettent ensuite leurs textes à l'approbation du bureau et des gens compétents de l'association. Il veut bien se charger de la mise en page et de la publication, comme pour le site des Kompanoj.

Marcelo doit avoir quelque part les fichiers originaux faits à l'époque sur un Atari.

- Projet de traduction d'un livre



Monique a rencontré cet été à Plouezec une personne qui propose la traduction collective en espéranto du livre d'Estelle Blanquet *Sciences à l'école, Côté jardin (le guide pratique de l'enseignant)* - Editions du Somnium. Estelle Blanquet est maître de conférences à l'Université de Bordeaux. Il s'agit d'un livre de plusieurs centaines de pages, qui serait traduit chapitre par chapitre par les groupes intéressés. Espéranto Gironde va recevoir le livre gratuitement.

Claudine a pu voir deux chapitres en ligne. Mais la question est de savoir à destination de qui serait faite cette traduction et dans quel but.

Il est suggéré de passer par ufe-anoncoj, la liste Francio, voire celle de SAT-Amikaro pour proposer le projet à d'éventuels traducteurs.

- Projekto pri la montaraj floroj

Marcelo prezentos la projekton post la manĝo.

4/ Diversaj demandoj

- JeanSeb demande que l'on rappelle par courriel la date et le lieu de l'AG quelques jours avant la date.

- Morine demande que l'AG ait lieu plus tôt en 2017 (vers le mois de septembre).

- Bernard nous fait part de la démarche de trois espérantistes (Maurice Juy, Guy Camy, François Lo Jacomo) auprès du directeur de cabinet de la ministre de l'Éducation Nationale. Le ministère ne s'oppose pas à une expérimentation pour des examens d'espéranto auprès de lycées. Il suffit de trouver des lycéens et des enseignants compétents.

- Morine pense que les TAP sont aussi un bon moyen d'intéresser les jeunes. Yannick parle du stage qui s'est déroulé la semaine précédente à Bouresse pour une formation en vue des TAP. Ce stage, guidé par Katalin Kovacs, a réuni plus de 20 stagiaires.

- Bernard offre un paquet de revues *Monato*, que JeanSeb prend pour l'université.

- Monique est allée voir Cheline à la maison de retraite le jour de son anniversaire. Elle a 4 sacs de livres en / sur l'espéranto à donner, avec albums de photos. Par ailleurs Monique voudrait se débarrasser des archives comptables de l'association depuis 1992 (3 caisses).

On pourrait peut-être les mettre dans une autre armoire à Cenon. L'association pourrait acheter l'armoire. Il faut avoir l'autorisation de l'installer. Marcelo et Claudine doivent se renseigner. Elvezio doit demander auprès du bureau des associations de la préfecture combien de temps doivent être conservées les archives comptables d'une association.

- **La prochaine réunion d'Espéranto Gironde aura lieu le dimanche 8 janvier.** Marcelo se renseigne pour savoir si la salle au château Palmer est libre ce jour-là.

5/ Renovigo de la estraro

Elvezio, Janine, Morine sont à nouveau candidats pour le conseil d'administration. Monique Dussenty démissionne de son poste de trésorière après 20 ans de service mais souhaite rester membre du conseil d'administration.

Sont élus à l'unanimité :

- Elvezio Canonica
- Janine Dumoulin
- Morine Stride
- Monique Dussenty

Le conseil d'administration se réunit immédiatement pour composer le bureau. Sont élus :

Président : Elvezio Canonica

Trésorière : Morine Stride

Secrétaire : Janine Dumoulin

Morine accepte de prendre chez elle les archives comptables de l'association.

L'assemblée générale se termine à 13h30.



Annexe

Espéranto Gironde

Rapport financier du 30 novembre 2015 au 6 novembre 2016

ESPERANTO GIRONDE		Rapport financier du		30/11/2015 AL 06/11/2016							
<u>Dépenses</u>	<u>Total</u>	<u>Gestion</u>	<u>Transferts</u>	<u>Librairie</u>	<u>Missions</u>	<u>Dons</u>	<u>CD Moriza</u>	<u>Lille 2015</u>	<u>Mouvements</u>		
			<u>Sat-Amik.</u>	<u>Matériel</u>	<u>Réceptions</u>	<u>Solidarité</u>			<u>de fonds</u>		
	1044,86	338,90	131,25	201,96	372,75						
										BILAN	
<u>Recettes</u>	<u>Total</u>	<u>Adhésions</u>	<u>Sat-Amik.</u>	<u>Librairie</u>	<u>Missions</u>	<u>Dons</u>	<u>CD Moriza</u>	<u>Lille 2015</u>	<u>Mouvements</u>		
		<u>Esp.Gde</u>		<u>Matériel</u>	<u>Réceptions</u>	<u>Solidarité</u>			<u>de fonds</u>		
	1577,01	421,00	175,00	150,30		25,00	485,00			320,71	
Bilan au 06/11/2016			532,15				CCP	solde au 31/10/2016		532,15	
Compte Epargne au 29/11/2015			4 632,02								
Intérêts au 31/12/2015				41,50							
Compte Epargne au 06/11/2016			4673,52								



Post la manĝo, Marcelo prezentas sian projekton «**Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke**».

Marcelo multe ŝatas foti florojn. Helpe de libro *450 fleurs – Les indispensables – Delachaux*, li proponas la projekton «Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke».

Tiu projekto povas interesi *Espéranto-Gironde*, sed ankaŭ aliajn (ekz. Isabelle Jacob en Limoges).



El la libro li ĉerpis informojn pri la diversaj floroj, kiujn li fotis. Do oni povus okazigi staĝojn por inspekti la florojn, promeni en la montaro, kanti, ludi...

Li montras bildojn de promenado en la alpa montaro pasintan julion.

Ĉiu floro estas objekto de unu slipo, sur kiu kuŝas: la latina nomo de la floro, ĝia franca nomo, la nomo de ĝia «familio»; ĝiaj karakterizaĵoj kun eventuale la legendoj, kiuj estas al ĝi ligitaj; unu foto.

El ĉiu slipo oni povas estiĝi ludojn.

Ekzemple vortludo: estas donitaj la unua kaj lasta literoj de la floro, kaj oni devas diveni ĉiun el la ceteraj. Se la propono estas ĝusta, la litero(j) aperas; se ne, neĝo falas sur la bildo. Post 6 eraroj, neĝinfano kovras la tutan bildon kaj la ludo estas perdita.

Oni povus sin trovi ie en montaro dum kelkaj tagoj por trovi, spekti florojn kaj ludi ĉiutage.



Poste Elvezio prezentas tre interesan bildaron pri la Universala Kongreso en Nitra.



Vidaĵo de Nitra

Raportis Janine



LA EFIKOJ DE ALOO VERA

ALOO VERA estas plurkvalita planto. Jen kion mi spertis okaze de brulvundo. Tranĉu peceton de via karnfolia planto, ALOO VERA. Tuj ŝmiru la doloran lokon per la suko, kiu elfluas el ĝi. Kun la sama branĉo, ripetu la agon plurfoje en la tago kaj en la sekvantaj tagoj. Aliaj kapabloj: por la bluajoj, insektpikoj, sunfrapo, ekzemo... Loke sternita, ĝi preskaŭ tuj mildigas jukojn kaj iritojn. Ĝi stimulas cikatriĝon.

Vi povas sterna ĝin sur la dolora loko sed ankaŭ ingesti ĝin. Jes! Ĝi efikas sur la digestan sistemon. Pro ĝiaj multaj enzimoj, ĝi reekvilibrigas la intestan flaŭron: glutu du supkulerplenojn da ĝelo freŝa aŭ diluita per iom da akvo antaŭ ĉiu el la tri ĉiutagaj manĝoj ĝis pliboniĝo.

Ĝi faciligas ankaŭ memoron, sangocirkuladon...

ALOO VERA posedas potencon efikon kontraŭbakterian, kontraŭsepsan kaj kontraŭvirusan, agnoskitan ekde Antikveco.

TRUKO! Por konservi la pulpon de via ALOO VERA:

Ideale uzu la pulpon tuj kolektitan. Sed vi povas konservi la folion por onte uzi ĝin. Ĉimaniere: tranĉu la folion en pecojn je 5 aŭ 6 centimetroj kaj unuope paku ilin en plastajn saketojn antaŭ ol meti ilin en fridujon aŭ eĉ en kongelujon.



Aloo Vera, magia planto !



Morine

STAĜOJ



Aprilo 14a - 22a: PRINTEMPaS
kursoj, KER-ekzamenoj, AMO-seminario

M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org



En februaro 2017 (datoj precizigotaj): Pedagogia staĝo
Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj gvidos 5-tagan seminarion celantan pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj.

KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE
Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org



Ne maltrafu!

**LA VENONTA KUNVENO
DE ESPERANTO-GIRONDE
OKAZOS LA 8an de JANUARO je la 10a 30
En CENON
NI PROFITOS LA OKAZON
POR FESTI LA REĜOJN
PER REĜKUKOJ KAJ TRINKAĴOJ
DONACITAJ DE ESPERANTO-GIRONDE!
VENU KUNFESTI!**





Kiel la korvo Tieceło forprenis fromaĝon de maljunulino kaj kiel Renardo forprenis ĝin de Tieceło.

Sur florplena ebenaĵo, kiun limis du montoj kaj trafluis kristalklara akvo, Renardo iam ekvidis de la kontraŭa bordo solan fagon plantitan malproksime de ĉiu ajn pado, baze de la deklivo.

Li transsaltas la rojon, atingas la arbon, kiel kutime postlasas spurojn sur la trunko, poste li volupte sterniĝas sur la freŝa herbo, anhelante por sin malvarmigi. En tiu loko lin ĉarmis ĉio; ĉio, mi eraras, ĉar li eksentis malsatpikon, kaj nenio esperigis al li mildigi ĝin. Dum li hezitis kion fari, Mastro Tieceło, la korvo, elflugis el la apuda arbaro, ŝvebis super la herbejo kaj surteriĝis en korto, kiu ŝajne promesis al li profitan aventuron.

Tie troviĝis milo da fromaĝoj, kiujn oni tie dismetis por ke ili subsune sekiĝu. La vartistino eniris la loĝejon dum mallonga tempo kaj Tieceło, kaptante la okazon, haltis sur unu el la plej belaj kaj reekflugis ĝuste kiam la maljunulino reaperis.

- Ve, mia kara sinjoro, ĉu por vi sekiĝas miaj fromaĝoj?

Tion dirante, la maljunulino ĵetis ŝtonojn kaj rokpecojn.


- Mutu, mutu, oldulino, respondas Tieceło, kiam oni demandos vin pri kiu forprenis ĝin, vi diros «mi, ja mi», ĉar misvartado lupon nutras.

Tieceło forflugas kaj venas stari sur la fagon, kiu agrable ombris Mastron Renardo. Kunigitaj ĉe la sama arbo, iliaj situacioj tute malsamis. Tieceło frandis kion li plej ŝatis. Renardo egale avida je la fromaĝo kaj la posedanto, ilin rigardis sen espero ilin atingi. La duonsekiĝinta fromaĝo faciligis bekadon. Tieceło eltiras ĝian plej flavan kaj molan parton; poste li ekbekas la kruston, sed ellasas peceton fali pieden de la arbo.

Renardo levas la kapon kaj salutas Tieceło-n, kiun li vidas fiere staranta kun la fromaĝo inter la kruroj.

-Ja, mi ne eraras, jen mastro Tieceło. Dio protektu vin, kunulo, vin kaj la animon de via patro, la fama kantisto. Laŭdire neniu, tiutempe, pli bele kantis ol li en Francujo. Ankaŭ vi mem muzikis, se mi bone memoras. Vi longatempe lernis ludi orgenon, ĉu mi tion prisonĝis? Je mia fido, ĉar min plezurigas renkonti vin, vi certe konsentos kanti por mi ritorneleton, ĉu ne?

(Daŭrigota)



Desegnis Morin'



Tiu rakonto memorigas al vi la faman fablon de La Fontaine, ĉu ne? Nu, jen tri Esperantaj versioj de ĝi, trovitaj sur la reto. Elektu!

Le Corbeau et le Renard

Maître corbeau, sur un arbre perché,
Tenait en son bec un fromage.
Maître renard, par l'odeur alléché,
Lui tint à peu près ce langage :
« Hé ! bonjour, Monsieur du Corbeau.
Que vous êtes joli ! que vous me semblez beau !
Sans mentir, si votre ramage
Se rapporte à votre plumage,
Vous êtes le phénix des hôtes de ces bois. »
A ces mots le corbeau ne se sent pas de joie ;
Et pour montrer sa belle voix,
Il ouvre un large bec, laisse tomber sa proie.
Le renard s'en saisit et dit : « Mon bon Monsieur,
Apprenez que tout flatteur
Vit aux dépens de celui qui l'écoute :
Cette leçon vaut bien un fromage, sans doute. »
Le corbeau, honteux et confus,
Jura, mais un peu tard, qu'on ne l'y prendrait plus.

Jean de La Fontaine, *Fables*, I, 2



Korvo kaj vulpo

Sur arbo sidante, la korvo-sinjor',
Fromaĝon en beko li tenis;
La vulp', allogite per bona odor',
Kun tia parolo alvenis:
«Bontagon, sinjoro nobela!
Ho kiel vi estas gracia kaj bela!
Se via voĉet', en kompar',
Ne cedas al via plumar',
Vi estas Fenikso de arboldantoj!»
La korvo, ĝojega pro tiu admir',
Por montri belecon de l' voĉo en kantoj,
Malfermas la bekon: «Grak'!» falas akir',
Kaj vulpo, kaptante ĝin, diras: «Eksciu,
Simplul', ke flatist' vivas ĉiu
Je kosto de lin aŭskultanta person',
Fromaĝon valoras ja ĉi-lecion'!»
La korvo ekĵuris en honto, konfuzo,
Ke poste neniu lin trompos per ruzo.

Antoni Grabowski (1857-1921)



Magistro korv' sur arbo altsidanta,
En sia bek' fromaĝon portis.
Magistro vulpo al odor' flaranta,
Tiele proksimume vortis:
«Saluton korva moŝto mia.
Senfine vi aspektas bela kaj gracia!
Se plie, via voĉo trilas
Agrable kiel plumoj brilas,
Vi estas de l'arbaro la feniksa gasto.»
Je tiuj vortoj ekĝojegas korvo vanta;
Por montri voĉon sen prokrasto
Malfermas larĝan bekon, jen rabaĵ' falanta.
La vulpo kaptas ĝin kaj diras ĝi: «Kunulo,
Nu eksciu, ke flatulo
De la kredema aŭskultant' profitas.
Ĉi tiu lecion', fromaĝon ja meritas.»
La korvo honta kaj konfuzo
Malfruis tro por ĵuri, ke ĝi estos ruza.

Lucien Thevenin (1891-1962)

La Korvo kaj la Vulpo

Fraŭlo Korvo, jen arbopinte,
Tenis enbeke fromaĝon.
Fraŭlo Vulpo, tiun spurinte,
Voĉis allogan omaĝon.
«He, saluton, sinjoro Korvul'.
Vi bela! Vi rava! Vi ĝu' por l' okul'!
Sincere, se via fanfaro
Egalus al via plumaro,
Vi estus fenikso de l' boska popol'.»
La Korvo ĝojegis ĉe tiu parol'.
Li por najtingali
La bekon malŝlosis, igante la predon elfali.
La Vulpo ĝin kaptis kaj diris «Bona moŝto,
Ke flatado je l' kosto
De l' aŭdintoj bonvivas, lernu vi nu.
Valoras fromaĝon do tiu instru'.»
La Korvo, konfuza kaj honta,
Malfrue nun ĵuris pri klero estonta.

PEJNO Simono (Simon Edward Adrian Payne, 1941-)





ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Morine STRIDE**
17 rue Voltaire
33670 CREON
Tel : 06 10 07 08 58 / morinestride@gmail.com

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr

